

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La duonigita 106-a Japana Esperanto-Kongreso, iel tiel

Ĉi-jara Japana Kongreso devus okazi en la urbo Saitama, 2 horojn trajne de Jokohamo, de la 12a ĝis la 14a de oktobro. Fakte ĝi okazis, sed nur posttagmeze de la 13a, ĉar venis furioza tajfuno (uragano) Hagibis kaj atakis nian regionon, kaj trafiko, precipe trajna, estis laŭplane nefunkciigita. La Loka Kongresa Komitato tuj antaŭ la kongreso avertis tion. Tial ĉe niaj rondanoj en Jokohamo estis tri tipoj de la aliĝintoj.

- (1) Jam de la komence planita tago (12a de okt.) estis en Saitama.
- (2) Iel vizitinta la kongresejon de la posttagmezo de la 13a de okt.
- (3) Tute rezigninta viziti Saitama.

Jen ni montras ekzemplon de (1) kaj (3)



Mia vojaĝeto al ĉi-jara JEK, uzante aŭton

NAMBA Fumiharu

Dum la ĉi-jara Japana Esperanto-Kongreso en Saitama (12-14a de oktobro), giganta tajfuno Hagibis atakis Japanion. La okazaĵoj en la 12a estis tute nuligitaj, kaj post kiam la tajfuno foriris, akcepteje malfermiĝis je tagmezo de la 13a. Tamen, dum la 13a, nur malmultaj partoprenantoj povis atingi la kongresejon. Mi komence planis por la JEK, ke ne uzi hotelon sed trifoje tage iri kaj reiri inter Jokohamo kaj Saitama. Ĝi estas sufiĉe proksima de Jokohamo, tial tranoktado ne estas bezonata. Tamen, pro la tajfuno giganta, mi ŝanĝis planon. Mi rezervis hotelon dum la kongreso. Kaj mi decidis uzi ne trajnon sed mian aŭton. Estas du kialoj. Unu estas ke publikaj trafikiloj supozeble malfunkcios pro la ŝtormo. Alia estas ke mi preparu kontraŭ plej katastrofa situacio, ekzemple detruo de domo. Mi ŝarĝis valoraĵojn diversajn en mian aŭton, por ke mi povu eskapi el danĝero kun miaj karaj aĵoj. Jen estas mia vojaĝeto skribita laŭtempe...

[12a, 7:30 matene] Kvankam tajfuno ankoraŭ estis malproksima, jam pluvis tre forte. Kun iom da maltrankvilo, mi ekveturis el la hejmo.

[12a, 8:00 matene] Por matenmanĝo, mi eniris butikcentron Totsukana apud la stacidomo

Totsuka. Parkejo de Totsukana estas multetaĝa kaj kuntegmenta, tial estas oportune en pluvega tempo. En la parkejo jam troviĝis multaj aŭtoj. Supozeble multaj homoj eskapigis siajn aŭtojn en ĉi tiun sekuran parkejon.

[12a, 9:30 matene] Mi ekveturis de Totsukana kaj veturadis sur aŭtoŝoseo al Tokio. En pluvego, mi devis veturi atente kaj iom malrapide. Proksime de kvartalo Akihabara, mi eliris de aŭtoŝoseo kaj veturis al...

[12a, 10:30 matene] Restoracio de supo-kareo Kamui, kiu situas proksime de Akihabara. Kamui estas konata kaj ŝatata de multaj juliamistoj, kiuj ekkonis Esperanton per komputila ludo *Kotonoha Amrilato*, pro tio, ke tiu kareejo jam ofte okazigis eventojn pri la ludo Amrilato. Malgraŭ severa ŝtormo de tajfuno, la mastro s-ro Morohashi decidis malfermian restoracion ĉi-tage. Por kuraĝigi la mastron mi elektis lian supo-kareon por tagmanĝo. Mi gustumis bonegan supo-kareon kun nudeloj. Dume mi mendis alian kareon en bovlo portebla.

[12a, 11:30 antaŭtagmeze] Ŝarĝinte la bovlon de supo-kareo, mi denove ekveturis. Kompanio de aŭtoŝoseo Shutoko jam anoncis ke tiu povos fermi la enirejojn posttagmeze, sed mi sukcese eniris je 11:40. La aŭtovojo al Saitama estis kvieta. Preskaŭ

neniu aŭto veturis. Nur estas forta vento kaj pluvo. Mi veturigis mian karan aŭton al Saitama.

[12a, 12:30 posttagmeze] Finfine mi atingis hotelon. Mi parkis la aŭton en maŝinan parkejon de hotelo. En tiu turo-forma parkejo, mia aŭto sekuros eĉ dum forta ŝtormo. Mi trankviliĝis. Tiu hotelo estas Toyoko-Inn en Saitama Fukutoshin. Pro tiu oportuneco kaj proksimeco al la kongresejo, multaj partoprenantoj loĝis en tiu hotelo. En la salono estis multaj loĝantoj kiuj atendis la malfermon de akceptado. Ĉe unu el multaj tabloj jam sidis kelkaj kongresanoj. Mi eniris en la grupon, salutis, babilis, kaj ektrinkis bieron!

[12a, 3:00 posttagmeze] Akceptado komenciĝis, kaj mi eniris mian ĉambron. Hura! Daŭris tempo libera sed nur enhotela. Eĉ se mi perforte irus eksteren en ŝtormo, ĉiuj butikoj kaj restoracioj jam estis fermitaj. Por vespermanĝo, mikroonde mi revarmigis supo-kareon de s-ro Morohashi. Jen, estis treege bongusta kaj trankviliga kareo por mi!

[12a, 9:30 nokte] Mi rigardis televidon en hotelĉambro. Centro de tajfuno jam venis ĉi tien. Pluvego kaj vento frapadis fenestron. Sed estis ne tre forte, nek terure. La hotelo situas tuj apud la unua pordego de granda ŝintoa sanktejo HikawaJinja. Supozeble, dio de la sanktejo gardas ĉi tiun kvartalon. (Klarigante pli serioze aŭ ateisme, homoj en longa historio praktike sciis pli sekurajn lokojn kaj elektis ilin por konstrui templojn kaj sanktejojn. Jen estas saĝo de prauloj!) Kiam vento sufiĉe malfortiĝis, mi enlitiĝis kaj endormiĝis.

[13a, 7:00 matene] Tajfuno jam foriris. Matena suno brilis kaj vento jam mildiĝis. En la televido estis multaj novaĵoj pri severaj damaĝoj pro la tajfuno, kaj tamen ĉirkaŭ la hotelo preskaŭ ne estis detruitaĵoj. Je la 7a, hotelo malfermis matenmanĝejon. Mi vidis multajn esperantistojn kiuj loĝis tie.

[13a, 9:00 matene] Post matenmanĝo, kiam mi ripozis en hotelĉambro, prezidanto de JEI s-ro Suzuki subite telefonis al mia ĉambro. Li klarigis, ke trajnoj de Keihin-tohoku linio ankoraŭ ne refunkciigas, kaj kapti taksiojn ankaŭ estas malfacile. Tial li petis de mi utiligi mian aŭton por transporti kongresanojn al la kongresejo. Mi tuj jesis. Kaj ni decidis ke ni kolektiĝu ĉe la hotelsalono je 9:50.

[13a, 10:00 matene] Bone veturu, mia kara aŭto! Je la 10a, ni ekiris de hotelo al kongresejo dum kelkkilometrojn longe. Ĉe la malantaŭa seĝo, s-ro Suzuki kaj s-ro So Jinsu, prezidanto de KEA konversaciis. Kaj aŭskultinte mi veturigis la aŭton.

Tre grava tasko... Mi laŭeble ŝoforis sekure.

[13a, 10:30 matene] Post kelkdek minutojnda veturado, ni atingis la kongresejon Saitama Kaikan. Akceptejo kaj libroservo jam malfermiĝis. Sed partoprenantoj ankoraŭ estis malmultaj pro la malfunkcio de diversaj trajnlinioj. Posttagmeze oni anoncis ke la linio Keihin-tohoku rekomencis veturadon. Post tio, partoprenantoj pli kaj pli multiĝis.

[13a, 2:30 posttagmeze] Kvankam mi sukcese atingis la kongresejon, estis unu problemo por mi. Vespere okazos bankedo, sed mi venis per aŭto kaj metis ĝin en la parkejo. Tial mi neniam povos trinki dum la bankedo. Mi denove ekiris de la kongresejo al hotelo Toyoko-Inn. En la urbo popolanoj aktivis regajni kutiman vivon de semajnfino, tial aŭtovojo jam estis tute plenigita de aŭtoj. Uzante duoblan tempon ol matene, mi revenis hotelon.

[13a, 6:30 vespere] Post mallonga ripozo en la hotelĉambro, mi denove iris al la kongresejo per trajno. Pro tio, mi povis trinki sufiĉe en bankedo. Mi feliĉe havis bonan kaj ĝojan tempon dum tiu bankedo.

[13a, 8:30 vespere] Fininte la bankedon, mi kaj kelkaj samhoteluloj kune reiris hotelen per taksio. Kaj ni (inkluzive de s-ro Mikaelo Bronŝtejn) daŭre trinkis kaj babilis multe en hotela salono. S-ro Bronŝtejn kunportis botelon de vodko. Ĝi estis vere bongusta.

[14a, 6:00 matene] Rezulte de vespera drinkado, je la sekvanta mateno mi havis soifon kaj malagrablecon. Post duŝado kaj matenmanĝo mi iom resaniĝis, sed estis ne taŭge veturigi aŭton. Mi lasis mian aŭton en la parkejo de hotelo, kaj mi iris al la kongresejo per trajno. Antaŭtagmeze mi ĉeestis en ĝenerala kunsido de JEI, kaj poste en seminario "Bonvenon vizitantoj" (temas pri *Kotonoha Amrilato*).

[14a, 4:00 posttagmeze] Posttagmeze mi aŭskultis la jubileajn prelegojn. Kaj poste, solena fermo okazis en la halo. Kvankam la programo duoniĝis, kiam la kongreso finiĝis, mi sentis sopiron kaj melankolion. Sed mi havis ankoraŭan taskon; reiri hejmen. Por preni mian aŭton, mi reiris al la hotelo per trajno. Jam estis vespere. Mi jam tute resaniĝis. Alkoholo jam foriris. Ne estis problemo por veturigi aŭton. Mi ekveturis de la hotelo Toyoko-inn al Jokohamo. Aŭtoŝoseo vespera estis iom timiga pro rapideco de multaj aŭtoj.

[14a, 6:00 vespere] Post 2 horoj da veturado, mi atingis hejmen. Feliĉe, la domo estis tute ne damaĝita de tajfuno. Mia frato diris ke la vento estis malpli forta ol la lastmonata tajfuno Faxai. Mi malŝarĝis multajn aĵojn kiujn mi kunportis per aŭto por eskapo. Tiel mia malnormala vojaĝeto finiĝis sen damaĝo.



↑
ekspozicio de
Kotonoha Amrilato



← S-ro Suzuki Keiichiro parolanta pri la 100-a historio de JEI

Domaĝa afero

Aida Yayoi

Domaĝa afero estas rezigno partopreni en la Japana Esperanto-kongreso en la urbo Uraŭa (la eksa nomo de la urbo Saitama) pro grandega inundo. Ni geedzoj planis partopreni kvar tagojn inkluzive postan ekskurson. Ĉar ni maljuniĝas pli kaj pli, ĉi tiu memora Kongreso de 100-jara jubileo de Japana Esperant-Instituto verŝajne estus nia lasta ŝanco de ĉeesto. Sorto estis kaprica, kaj ne favoris nin. La trafiko malfunkciis dum longa tempo kaj ni finfine rezignis sciigante la nuligon al la kongresa komitato. Kiom da homoj povis atingi la kongresejon en la urbo Uraŭa? Mi enviis ilin, ĉar Uraŭa estis mia multjara loĝloko en la juneco kaj mi arde deziris viziti la karan urbon denove okaze de la Kongreso.

Beletro

Rakonto pri 100 verkistoj — Leĝo de la urbeto Poriko —

Verkis OOTA Hiroya / Tradukis KOYAMA Takesi

(3)

“Jes, ĉiu rakonto certe fariĝis enua kaj bagatela.” — ĉiuj diris.

“Kiam mi aŭskultis gajan rakonton, mi sentis min malgaja; kiam mi aŭskultis malgajan rakonton, mi sentis min stulta; kaj kiam mi aŭskultis teruran rakonton, mi fariĝis ridema.”

“Sed kiam mi aŭskultis nekompreneblan rakonton, mi tiam nur sentis min konfuzita.” — la persono, kiu tiel flatis, estis edzino de udonejo*. Sed forpelante farunon sur antaŭtuko ŝi haste rekorektis: “Ne, mi ne laŭdis.”

“Supozeble la 100 verkistoj pensas, ke la faruno de udono konsistas el pulvoroj de udono, kaj ke eĉ kiam ili faras rakonton, ili povus reskribi facile ĉiutagan vivon aŭ aferon.”

“Ne, nepardoneble!” — la policano diris kolere: “Se temas pri ĉiutaga vivo de popolo kaj afero de la mondo, ni scias pli bone ol la verkistoj.”

“Jes, vi pravas!” — diris la edzino de urbestro;

“Ili estas tute malaj. Ĝenerale rakonto devas riĉigi nian vivon, sed kontraŭe ili prenas originalon de rakonto el niaj vivoj.”

“Jes, sinjorino!” — la edzino de udonejo plu diris gajplene.

“Tial la laboro de la verkistoj estas senutila. Ili pulvorigis bone faritan udonon kaj ili denove faras udonon el la pulvoro. Laŭ la opinioj de 100 verkistoj, se ili ne faras tiele, ili ne povas verki rakonton. Estas mokinde. Ili kredas ke ili povas fari bonan udonon, malgraŭ tio ke neniu el la 100 verkistoj havas la memfaritan farunon.”

“Verdire, tia udono... Ne, tia rakonto estas bagatela. Niaj rakontoj, kiujn ni memfaras en la kapo, certe estus pli multe amuzaj ol iliaj rakontoj. Krome se ĝi estas memfarita rakonto, ĝi certe restos en mia kapo same kiel mia ĉapelo, eĉ se ĝi estas iom bagatela.” — diris la estro de ĉapelejo.

“Jes, vi pravas. Labori por fari plaĉan rakonton en la kapo estas pli agrable ol aŭskulti la

rakonton de la verkistoj.” — alia diris.

“Certe en nuna cirkonstanco ni estas okupitaj de ĉiutagaj rakontoj. Do ni ne havas tempon por lavi malpuraĵon aŭ streĉi horloĝon. Tio estas ne bona por pasigi tempon.” — denove la edzino de la urbestro tuj diris kun indigno.

“Ne, sinjorino! Mi toleras nur pri la kosumado de tempo, sed en mia domo eĉ horloĝoj estis rompigitaj kaj mi ricevis gravan damaĝon.”

Ĉiuj subridis kaŝe, kiam la edzino de horloĝejo diris tion.

(4)

“Ne, ne ridindaĵo!” Trarigardante kolektiĝantojn la policano de la policejo Poriko diris akraŭde kun severaj okuloj.

“Se la tempo detruigis, ankaŭ la horloĝo detruigis. Ne, ne nur la horloĝo sed eĉ la urbeto Poriko detruigis post nelonge. Komprenoble ankaŭ ni ĉiuj frakasiĝos.”

Aŭskultante la teruran rakonton de la policano, ĉiuj paliĝis.

“Kion ni devos fari?” Ulo demandis lin timoplene, ĉar iu ajn abomenas ke oni estos detruita.

“Jes, mi komprenas vin.” — La policano simple respondis.— “Mi opinias, ke estas bone

forpeli la 100 verkistojn de la urbeto Poriko.”

“Ej, tio estas kompatinda juĝo.” La edzino de la urbestro diris surprizite.

“Ne, verdire mi deziras, ke mi metu ilin en malliberejon.” La policano aldonis.

“Ho, terura eldiro tio estas.”

“Sed... hm... se ili ĉesos fari rakonton, mi permesu ĉiujn kaj mi faros ilin 100 policanoj de Poriko, mi pensas. Se tio realiĝos, mi havos 100 pliajn amikojn.”

“Ho, ĝi estas feliĉa sciigo.” La edzino de urbestro ĝojis kun aplaŭdo.

Sed la mastro de ĉapelejo diris malkontente. “Mi deziras, ke la 100 verkistoj helpu min por volvi rubandon ĉirkaŭ ĉapelo.”

Tiam la edzino de udonejo diris. “Mi deziras, ke la 100 verkistoj turnadu pezan muelŝtonon kaj muelu tritikon. Komprenoble tio estas bona eduko por ili.”

Ankaŭ la edzino de horloĝisto sole decidis arbitre. “Ni dungos ilin kaj ili streĉu risorton de ĉiuj horloĝoj en la urbeto Poriko. Ĉu bone?”

(*daŭrigota*)

(*) udonejo: japana populara manĝejo servanta udonon, t.e. knedpastaĵon iom similan al spagetoj, faritan el tritika faruno.

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso “Eseoj”, por legi “Tamen ĝi moviĝas!” gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas (de aprilo) “La Ŝtona Urbo”, originalan romanon de Anna Löwenstein, 1 fojon — libera verkado; kaj alian fojon —tradukado laŭ sia plaĉa fonto.

*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso “Belĉielo”, por legi “Silento”, tradukon de la japanlingva originalo, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso “eriko”, por legi “Utila Estas Aliĝo”, kaj poste “Kumeŭaŭa”, gvidate de Doi Ĉieko

*Neregula Klaso

(1) Klaso “Teksantoj”, por legi “Kuniberto kaj Kilevamba”, per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate.

*Rapida Kurso, por legi la lernolibron “Esperanto laŭ metodo Friis”, per la gvido de Doi Ĉieko, unu fojon semajne, en la Universitato de la Urbo Jokohamo.

Ne okazos

Jena programo planita ne okazos — ĉar s-ro Mikaelo Bronŝtein perdis sian familianon en oktobro, kaj finante dumvoje sian prelegan rondvojaĝon en Japanio, reiris sian hejmlandon.

*nov. 10 (dim) [KK] Speciala prelego de s-ro Mikaelo Bronŝtein

Niaj Planoj

*dec. 8 (dim) [Civitana Kultura Halo en Urbo Ĉigasaki] La 49-a Zamenhof-Festo de la Esperantaj grupoj en Gubernio Kanagawa